Mia vivo

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Mia vivo kvazaû trajn' rapidas
Ĉiu jaro kvazaû la vagon'
En vagonoj multaj homoj sidas,
Sed pli multaj restis sur peron'.

En vagon' unua mi naskiĝis
Mi memoras varmon de patrin'
Jam neniam povos mi estiĝi
Ree de komenco de l'destin'.

Rf - I: Kiaj grandaj,
kiaj grandaj estis la vagonoj
Kaj rapida,
kaj rapida estis mia trajn'.
Mi memoras bone lecionojn
de stacioj de Eraroj kaj Malgajn'.
Mia vivo.

Mi ne scias ĝuste vojdirekton.
Ne konjektas pri sekvantstaci
sed, se eblecon havus mi elekti
nepre mi elektus trajnon ĉi.

Mia trajno havas la vagonojn
jam tridek, em ĉiu loĝas mi.
Vojo estis bona kaj malbona,
Sed neniam estis sen amik'

Rf - II: Multe da stacioj,
multe da stacioj preterpasis.
Multajn homojn,
multajn homojn mi renkontis jam.
Sed ne perads mi esperon trafi
al stacio de Feliĉo kaj la Am'.
Mia vivo.